

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

La pasintan semajnon ni anoncis al vi la aperon de bela libro : de la novelaro *Vole...Novele* de Raymond Schwartz, kaj ni legis al vi eron el unu el tiuj perloj de nia literaturo originala. Jen hodiaŭ por vin instigi aĉeti tiun bele prezentitan kaj bele binditan libron ni legas al vi alian tekston, kiu estas titolita :

A.- *La fornotubo de la familio Ŝmirman.*

Cl.- *Hodiaŭ neniu plu dubas pri la utileco de fornotubo. Ĝi apartenas al la akiraĵoj de l' progreso. Kaj certe, ĝi faras al nia moderna civilizacio la plej valorajn servojn, kondiĉe, ke ĝi estu sendifekta. Tiaj, proksimume, estis la saĝaj pensoj, kiujn sinjoro Ŝmirman jam de kelka tempo mense maĉis kaj remaĉis. Kaj, ĉar la tubo de lia forno vid-kaj-flareble ne plu estis sendifekta, li alvenis al la ĝusta konkludo, ke estus pli oportune aĉeti novan.*

A.- *« Fine vi ekkomprenas, kion mi predikas de jam tri semajnoj ! »* lia edzino kontente rimarkigis, kiam li konfesis, ke la malnova tubo ne plu estas riparebla kaj tial nepre anstataŭota. Tuj la du filinoj, Flora kaj Orlana, aldonis kvazaŭ ĥore :

Cl.- *« Dank'al Dio, oni ne plu sufokiĝos ĉi tie ! »*

A.- *Du tagojn poste la fajenca forno en la manĝoĉambro de la familio Ŝmirman havis novan tubon, kies freŝa lakbrilo meritis ĝeneralan admiron. De nun la aero estis enspirebla. La atmosfero pliklariĝis kaj, kun ĝi, la humoro de la familio.*

Cl.- *La malnova tubo, senzorge ĵetita en balaĵkeston, kriples melankoliis en kuirejgulo kaj dramece konfirmis, kion jam Swift diris pri la malĝoja sorto de eksbalailo : La homoj estas sendankaj kontraŭ siaj plej fidelaj servistoj. Sinjoro Ŝmirman estis pli ol nur sendanka. Li havis praktikan sencon. Li venigis brokantiston.*

A.- *« Jen fornotubo », li reklamis, « eble ne plu tute nova, sed konstatu, ke ĝi estas preskaŭ sendifekta kaj certe ankoraŭ bone uzebla. Kiom, vi opinias, ke ĝi valoras ? »*

Cl.- *La brokantisto faklerte ekzamenis la tubon en ĉiuj detaloj, ekstere kaj interne, hezite balancis la kapon, reĵetis la tubon en la keston kaj grave dekretis :*

A.- *« Sinjoro Ŝmirman, tiu tubo estas absolute neutiligebla. Ĝi valoras nenion. Eĉ se vi donacus ĝin al mi, mi ne akceptus ĝin ».*

Cl.- *« Bone, » diris Ŝmirman, trompita en sia espero « bone, se tiel estas, ĝi jam restu kun la balaĵoj. »*

A.- *Kaj la saman vesperon la du filinoj, Flora kaj Orlana kiel kutime metis la balaĵkeston antaŭ la pordon, sur la trotuaron kaj, ĉar la tubo estis tro longa, ili lokis ĝin apud la keston.*

Cl.- *La sekvantan matenon, kiam sinjorino Ŝmirman eliris kun sia laktokruĉo, ŝi vidis, ke la kesto estas malplena, sed ke la fornotubo staras ankoraŭ apud la dompordo.*

A.- *« He ! » ŝi vokis al la balaĵistoj, kiuj troviĝis nur kelkajn domojn pli malproksime, « vi forĝesis la fornotubon ! Ankaŭ ĝi estas forportota. »*

Cl.- *« Ni ne prenos ĝin », respondis dika viro sur la veturilo, « ĉu hazarde vi kredas, ke ni estas feraĵistoj ? – Krom tio, ĝi estas tro longa, via tubo, ĝi embarasus nin ! »*

A.- *« Nu, se vi ne prenas, ĝi restu sur la strato, » sinjorino Ŝmirman fiere rikanis. Kaj la fornotubo restis tute sola. Ne tre longe. Okaze de sia unua rondiro la urba policisto Mops inspektis de pli proksime. Post konscienca ekzameno li konkludis :*

Cl.- « Ŝajnas al ni, ke tio estas malnova fornotubo, jes ja ! – Kontraŭe al ĉiuj dekretoj de l' urba regularo ĝi ĝenas la trafikon sur la strato, jes ja ! Ni enketu ! » - Longe studinte la topografion de la loko li fine opiniis, ke la dirita tubo kredeble devenas el la domo, antaŭ kiu ĝi staras. Decide li eniris kaj sonorigis.

A.- « En la nomo de la Leĝo », li alparolis la mirantan sinjoron Ŝmirman, ĉu tiu malnova tubo, kiu senakompane vagas sur la trotuaro, apartenas al via familio ? »

Cl.- « Jes, balbutis Ŝmirman, kaj pro tima antaŭsento li apenaŭ sukcesis gluti la lastan pecon de sia bulko.

A.- « Do zorgu, ke ĝi tuj malaperu, se vi ne volas, ke mi protokolu ! »

Cl.- « Sed la balaafistoj... » li provis senkulpiĝi.

A.- « Ne kontraŭdiru la dekretojn de l' urba regularo, aŭ mi arestos vin, jes ja ! »

Cl.- « Mi neniel kontraŭdiras, » asertis Ŝmirman, mi tuj reprenos la fornotubon. » Kaj sub la severa kontrolo de l' policista okulo, li faris tion. Sed jam li havis sian planon.

A.- *Vespere, kiam la duba grizo de l' nokto vualis la stratojn, sinjoro Ŝmirman plej singarde ŝteliris el sia domo, tenante sub la dekstra brako, preme kontraŭ la korpo, la longan fornotubon. Post esplora rondrigardo li rapide ekiris, honte miksanse sian silueton kun la ombroj de l' nokto, kvazaŭ rampe tra senlumaj stratoj ĝis li alvenis ĉe dezerta angulo de sakstrateto, kaj tie precize, kie dumtage oni povas legi la averton « Estas malpermesite meti balaafistojn ! » li senbrue postlasis sian fornotubon. Pli libere li paŝis al sia hejmo. Sed sakstrateto havas nur unu elirejon. Kaj tie staris senmove, ambaŭ pugnoj sur la koksoj, la urba policito Mops. Ŝmirman ne povis elgliti. Li tamen, kun provoka aplombo, ŝajnigis sin plej senzorga kaj ekfajfis gajan arieton. Sed ve ! La terura Mops ne estas superruzebla, kaj ordone jam li basis :*

Cl.- « He, civitano, haltu iomete ! Ŝajnas al ni, ke kontraŭe al ĉiuj dekretoj de l' urba regularo vi ĵus demetis tie vian fornotubon, jes ja ! Sed tiun ĉi fojon mi tenas vin. » Kaj jam lia grasa mano krajonis sur la libreton : « Via nomo ? – Profesio ? Adreso ? – Bone. Vi ekscios, kiom kostas moki la leĝojn. Kaj nun bonvolu tuj repreni vian tubon, jes ja ! »

A.- Pli honte ol batita hundo sinjoro Ŝmirman reiris hejmen kun la malnova tubo.

Cl.- Se vi deziras koni la aliajn aventurojn de la familio Ŝmirman koncerne al la forigo de tiu fornotubo, ni konsilas al vi la legadon de la novelaro de Raymond Schwartz : *Vole...Novele*, kiun ĵus eldonis TK en Kopenhago.

A.- Vi aŭdis legadon el Svislando.

Cl.- Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-